

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONA-HISPANUJO

AVIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

ENHAVO: El propra hejmo. — Sesa Universala Kongreso de Esperanto. = Enketo. — Enlanda Movado. — Alilanda Movado. — Oficiala Parto.

EL PROPRA HEJMO

ALVENIS aŭtuno! Kiam tiu sezono antaŭsentigas, kiam la naturo grizigas kaj antaŭsciigas al ni la alproksimiĝon de la vintro kun ventoj kaj malvarmoj, kun noktoj longaj — terure longedaŭraj, kaj kun suno duonsveninta; kiam preskaŭ ĉiuj arboj senfoliiĝas kaj ĉio en la kampo, en la monto, en la arbaro ŝajnas silenti kaj ĉesi vivi, ni — la esperantistoj — rekomencas nian interrompitan agadon. Ĉien oni vidas aŭ divenas la ekentreprenitan laboron; ĉien oni konstatas movadon, agadon, entreprenojn; novaj batalantoj ekaperas; la malnovaj daŭrigas la haltigitan pro somerripozo, laboron; kunvenojn, kursojn, paroladojn, festojn, ekskursojn, ĉio kio estas propagando kaj disvastigo de nia celo oni faras kaj pretigas, kaj antaŭ ĉio tio-ĉi oni sin demandas, ĉu ekkomencis aŭtuno aŭ printempo; ĉu la folioj falas aŭ burĝonas; ĉu la vetero estas griza aŭ ridetanta, vivoplena, hela...

Mi eĉ kuraĝus kredi ke ekzistas por ni nek aŭtuna nek vintra sezonoj, se la malvarmo kaj malsekaj noktoj kaj tagoj ne devigus al mi, malsanuleto, enbejmiĝi frue ĉiutage kaj pasigi en ŝajna ripozo la tro longedaŭrajn vesperojn kaj postvespermanĝojn; kaj ĝuste estas

en unu el tiuj noktoj, kiam la ĉielo tute hela, tute blua — antaŭsignoj de la malvarmo — ke mi konstatas tiun kontraston. Kaj mi min diras, ke estos por nia movado granda fruktedona bono, ke ni esperantistoj sentus neniam en nia rondo la senfoliigon, la griziigon, la malvarmon, la morton kaj eĉ la antaŭsignojn de aŭtuno. Ke aŭtuno ne alvenu por la arbo de Esperanto!

* * *

Aŭtuno alvenis, kaj kun ĝi novaj esperoj, novaj entuziasmoj, novaj kuraĝoj realaj, efektiviĝintaj. Kvazaŭ folio-novaĵo deŝirinta, forflugante haltis ĉe mi gazeto kiu asertas kio restas de mi skribita. La *Publicidad* la malnova ĉiutaga ĵurnalo kiu dum la tempo de la V^a raportis la Internacian Kongreson en Barcelona, decidis publikigi *Esperanta'n Rubriko'n*. Ĉu ne vere ni estas en printempo? Tio estas la suno kiu ree hele brilas. Ĝi lumis antaŭ multe, ĉu tempe, ĉu intermite ĉe aliaj ĉiutagaj barcelonaj ĵurnaloj, sed nia pasiveco igis tiun sunon kaŝi sub densaj nuboj. Ni ne plendu pri tio nune, kiam ĝi lumas pli intense, sed ni sciu per nia individua kunhelpado atingi ke ĝi brilu ĉiutage pli hele, pli varme, pli viviganta pro tio, ke ni devas ŝati eternan printempon. La Esperanta aŭtuno, for! for!

* * *

Aŭtuno alvenis! Folio deŝiris el arbo de Esperanto: tio bedaŭrinde estas tute vere! Kiam mi ĝin rimarkis, mi sentis kvazaŭ mordeton en la koro. Folio deŝiris, kaj falis. Kiam ĝi falis ĝi rememoris al mi tiujn, kiuj ankaŭ en nia lando flavigis kaj la vento forkunportis — «*Espero de Katalunjo*», «*Stelo Kataluna*», «*Jen*», «*Supren*». — «*Morto estas vivo*», diras proverbo. Antaŭ nune eble estis tiel, ĉar malgraŭ la morto de tiuj gazetoj multe antaŭeniris kaj firmiĝis nia movado ĉe ni. Sed la morto de la gazeto *Semo* eldonata de la barcelona grupo «*Paco kaj Amo*» montras la malon. Tiun ĉi fojon «*Morto estas morto*» kaj kio unuavide ŝajnos ke devus pleniĝi el mi per ĝojo, pro tio, ke «*K. E.*» havos malplian konkuranton, min malĝojigas ĉar ni ne estas komercistoj. Ĉio koncernanta al nia movado pli impresas min en la koro ol en la kapo, kaj mi bedaŭras la malaperon de *Semo*. Estas ankoraŭ tempo por pripensi, samideanoj! La sperto devus ja nin instrui grandmaniere por daŭrigi sur nia vojo. Ni liveru

la vivigantan sukon al arbo de nia ideo por ke la ŝajnaj vivantaj folioj, la aspekto vivantaj branĉoj ne mortu!

Aŭtuno, aŭtuno! Terure, vi grizigas mian koron: ĉu novan folion deŝiriĝos? Ĉu ankaŭ en nia kampo vi efikos? For, for, vi!

D. SERDÁ



SESA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

MALFERMA PAROLO DE DRO. L. L. ZAMENHOF

LANDO de libereco, lando de estonteco, mi vin salutas! Lando, pri kiu revis kaj nun ankoraŭ revas multaj suferantoj kaj senkulpaj persekutatoj, mi vin salutas. Regno de homoj, kiu apartenas ne al tiu aŭ alia gento aŭ eklezio, sed al ĉiuj siaj honestaj filoj, mi klinas min antaŭ vi, kaj mi estas feliĉa, ke la sorto permesis al mi vin vidi kaj spiri almenaŭ dum kelka tempo vian liberan, de neniu monopoligitan aeron.

Saluton al vi, Usono, plej potenca reprezentanto de la nova mondō. Ni, filoj de la malnova kaj maljuna kontinento, venis al vi kiel gastoj; sed ne vidama turismo enŝipigis nin, ne la espero de ia komerca akiro pelis nin al via bordo, ni venis al vi, por alporti al vi novan senton kaj novan ideon, ni venis, por alporti novan kuragon al tiuj niaj samideanoj kaj samidealanoj, kiuj ĝis nun laboris inter vi kaj kies vortoj pri ia nova popolo eble ŝajnis al vi tro fabelaj. Peco de tiu miksdevena kaj tamen lingve kaj kore unuigita popolo nun staras antaŭ vi reale kaj vivante. Rigardu nin, aŭskultu nin, kaj konvinkigu, ke ni ne estas fabelo. Ni estas diversgentanoj, kaj tamen ni sentas nin kiel samgentanoj, ĉar ni komprenas nin kiel samgentanoj, havante nenian bezonon humiligi aŭ fremdlingve balbutigi unu la alian. Ni esperas, ke dank' al nia laborado, pli aŭ malpli frue la tuta mondo similigos al ni kaj fariĝos unu granda homa gento, konsistanta el diversaj familioj, interne apartlingvaj kaj apartmoraj, sed ekstere samlingvaj kaj sammoraj. Al tiu nia laborado, kiu celas krei iom post iom unuigitan, sekve fortigitan kaj spirite altigitan homaron, ni nun invitas vin, filoj de Usono. Kaj ni esperas, ke nia voko ne restos vana,

sed ĝi baldaŭ eĥe resonos en ĉiuj anguloj de via lando kaj tra tuta via kontinento.

Nur tre malmultaj el ni povis veni en vian landon, ĉar ni, esperantistoj, ne estas homoj riĉaj; de nia nuna kongreso ni sekve ne povas atendi gravajn decidojn, kiuj havus signifon por la tuta esperantistaro. Ni venis al vi, Usonanoj, precipe por pasigi en via mezo kaj antaŭ viaj okuloj unu semajnon de nia esperantista vivo, por montri al vi almenaŭ malgrandan pecon de tiu vivo, por alporti al vi semon; kaj ni esperas, ke post nia foriro tiu semo potence ĝermos kaj kreskos, kaj en via lando nia afero baldaŭ havos siajn plej fervorajn kaj plej gravajn apostolojn.

* * *

En via lando, Usonaj samideanoj, nia afero estas ankoraŭ tro juna, kaj multaj el vi ne ellaboris al si ankoraŭ tute klaran juĝon pri ĝi; tial permesu, ke mi almenaŭ *iom* esploru antaŭ vi la vojon, kiun ni iras.

Kion celas la esperantista movado? Ĝi celas atingi reciprokan komprenadon inter ĉiuj homoj kaj popoloj. Por kio ni bezonas tian reciprokan komprenadon? Kiaj estas la sekvoj, kiujn ni atendas de ĝi? Kial ni deziras, ke ĝi estu nepre sur fundamento neŭtrala? Kial ni tiel persiste laboras por ĝi? Kia estas la spirito, kiu nin ĉiujn ligas inter ni? Pri ĉio ĉi tio mi jam multe parolis, kaj mi ne volas nun ripeti miajn vortojn, des pli, ke ĉiu el vi post kelka meditado facile mem trovos la respondojn. Antaŭ vi, praktikaj Amerikanoj, mi volas analizi alian demandon, nome: ĉu ni kun nia laborado staras sur vojo tute *certa*, aŭ ĉu ni povas timi, ke iam nia tuta laborado montriĝos vana? Nur plena konscio pri la irota vojo donas al la marŝantoj sufiĉe da energio, por kontraŭbatali ĉiujn malfacilaĵojn, kiuj troviĝas sur la vojo.

La celo, por kiu ni laboras, povas esti atingita per du vojoj; aŭ per laborado de homoj privataj, t. e. de la popolaj amasoj, aŭ per dekreto de la registaroj. Plej kredeble nia afero estos atingita per la vojo unua, ĉar al tia afero, kiel nia, la registaroj venas kun sia sankcio kaj helpo ordinaro nur tiam, kiam ĉio estas jam tute preta. Kia devas esti la karaktero de la unua vojo, pri tio neniu povas dubi; pri afero, kies tuta esenco kaj vivo estas bazita sur interkonsento, ĉiu komprenas tre bone, ke laborado de amasoj povas ĝin konduki al celo nur tiam, se ĉiuj laboras unuanime. En tia afero, se ĝi per si mem montriĝis vivipova, konkordo estas la plej certa garantio de

senduba sukceso, malkonkordo signifas la morton. Tion komprenas tre bone niaj samideanoj, kaj tial ili kun indigno forpuŝas ĉiun, kiu volas delogi ilin de la komuna vojo. Sed iufoje en la kapo de tiu aŭ alia samideano aperas la sekvanta demando; kio estos la sekvo, se la solvon de la internacilingva problemo volos iam preni sur sin ia granda *forto*, kontraŭ kiu ni ĉiuj estas tro senfortaj, ekzemple la registaroj de la mondo? Ĉu ni devas timi, ke ili eble elektos alian solvon, ol ni elektis, kaj tiamaniere nia tuta laborado fariĝos vana?

Por trovi klaran respondon al tiu demando, ni prezentu al ni, ke la registaroj de la mondo aŭ iaj aliaj grandaj kaj influaj potencoj starigis aŭtoritatan komitaton, kiu devas decidi, kia lingvo devas fariĝi internacia. En la artikolo *Esenco kaj Estonteco*, kiun multaj el vi legis en la *Fundamenta Krestomatio*, mi analizis tiun demandon detale kaj mi montris tute klare tion, pri kio en la nuna tempo jam neniu esploranto dubas, nome, ke tia komitato, pri kio mi parolis, neniel povus elekti ian lingvon nacian, nek ian lingvon mortintan, nek ian lingvon kun plene elpensita vortaro, sed ĝi devus nepre elekti nur aŭ Esperanton en ĝia nuna formo, aŭ Esperanton iom ŝanĝitan. Se la komitato kontraŭ ĉiuj postuloj de la prudento, volus fari ian alian decidon, ĝia decido restus nur decido papera kaj praktike absolute senvalora. Nun ni rigardu, kia estas la sola maniero, en kiu la komitato povus solvi la lastan alternativon.

Plej nature kaj plej kredeble estas, ke la komitatanoj rezonados simple en la sekvanta maniero: «Ekzistas lingvo artefarita, kiu montriĝis tute vivipova, bonege funkcias, bonege sin tenas jam multe de jaroj, kreis grandan literaturon, ellaboris sian spiriton kaj vivon, k. t. p.; sekve anstataŭ fari tute senbezone kaj sencele riskajn novajn eksperimentojn, ni simple akceptu tion, kio jam ekzistas, ni donu al ĝi la aŭtoritatan apogon de la registaroj, kiujn ni reprezentas, kaj tiam la tuta eterna problemo estos tuj plene solvita, kaj de morgaŭ la tuta civilizita homaro reciproke sin komprenos.»

Tia, mi ripetas, estas la plej natura decido, kiun ni povas atendi de la registare elektota komitato. Sed ni supozu, ke la komitato trovos, ke diversaj ŝanĝoj en Esperanto estas efektive tre *necesaj*. Kiel do ĝi agos?

Antaŭ ĉio ĝi sin demandos, ĉu ĝi estas sufiĉe *forta*, por altrudi sian teorion volon al tiuj multaj miloj da homoj, kiuj ĝis nun estis la solaj laborantoj en la afero. La esperantistoj laboris dum longa vico da jaroj, multe laboris, multe oferis kaj kun tre granda malfacileco fine akiris tion, kio dum multaj mil-jaroj ŝajnis neakirebla kaj kio, unu fojon perdita, neniam plu reakiriĝus, ĉar la mondo perdis la

tutan konfidon al la internacilingva ideo. Sekve ĉiu prudenta komitato dirus al si : ni devas esti tre singardaj, por ke, anstataŭ akceli la aferon, ni ĝin ne pereigu por ĉiam. Se la komitato scius, ke ĝin elektis ekzemple nur ia unu tre malgranda kaj malgrava landeto, ke la elekto estis nur tute senvalora formalajo, ke la elektintoj tute sin ne interesas pri la afero kaj ne havas eĉ la plej malgrandan intencon ĝin subteni, nek la forton por tio, tiam prudentaj komitatanoj nur simple esprimus sian opinion kaj dezirojn pri diversaj farindaj ŝanĝoj en Esperanto kaj lasus la akceptadon aŭ neakceptadon al la decido de la esperantistoj mem, sed neniam komencus konkuradon kontraŭ la esperantistaro, ĉar ili komprenus, ke morale tio estus nur peko kontraŭ la internacilingva ideo kaj praktike ĝi pli au malpli frue kondukus nur al fiasko.

Nun ni supozu, ke por la decido de la demando pri lingvo internacia estas kreita komitato, kiu havas forton ne *fikcian* sed *efektivan* kaj *grandan*. Antaŭe mi jam montris, ke se tia komitato ne volos, ke ĝia decido restu praktike absolute senvalora, ĝi povos preni nur aŭ Esperanton, aŭ ion tre similan al Esperanto. Mi diris jam, ke plej kredeble ĝi akceptos simple Esperanton en ĝia nuna formo. Sed ni supozu, ke ĝi tion ne volos fari; kiel do ĝi agos? Ĉar ĝi komprenos tre bone, ke por krei vivipovan lingvon tute ne sufiĉas esti instruita homo kaj diri al si «mi kreos»; ke oni ne povas tion fari laŭ mendo en la daŭro de kelke da semajnoj; ke tio postulas tre longan, fervoran, sindoneman, amoplenan laboradon, elprovadon, trasentadon, k. t. p.; kaj ĉar ĝi scios, ke ekzistas jam lingvo, super kiu multe da homoj tre longe laboris, kiu havas multejaran historion, kaj tutan vivon, ke tiu lingvo bonege funkcias, kaj nur malmultaj punktoj povas en ĝi esti disputeblaj : tial estas tute kompreneble, ke se la komitato traktos sian taskon serioze, ĝi ne riskos preni sur sin mem la kreadon de tute nova lingvo, nek prenos alian lingvan projekton, kiun la vivo ankoraŭ ne sufiĉe elprovis. ne komencos tute senbezzone, sekve neprudente bataladon kontraŭ tiuj, kiuj ĝis nun laboris en la afero, sed ĝi prenos Esperanton kaj faros en ĝi tiujn ŝanĝojn, kiujn ĝi trovos necesaj.

Al kiu la komitato komisius la faradon de la ŝanĝoj? En la tempo *prepara*, kiam estus necese esplori principe la demandon, *kian* lingvon oni devas elekti, la komitato povus komisi la laboron al kiu ajn, zorgante nur, ke la elektitoj estu homoj prudentaj kaj senpartiaj kaj komprenu la tutan respondecon, kiun ili prenas sur sin. Sed kiam la lingvo estus jam elektita kaj oni decidus fari en ĝi ŝanĝojn, kun kiu oni konsiliĝus pri tiu laboro? La plej simpla prudento kaj la plej

simpla komprenado de sciencaj metodoj diras, ke pri tia laboro oni devus konsiliĝi ne kun personoj, kiuj konas la lingvon de *ekstere*, sed antaŭ ĉio kun personoj, kiuj plej bone konas la lingvon *interne*, kiuj plej multe *laboris* por ĝi, plej multe praktike ĝin *uzis* kaj sekve havas en ĝi plej grandan sperton kaj plej bone konas ĝiajn mankojn *efektivajn*. Ĉiu komprenas tre bone, ke fari ŝanĝojn en iu lingvo, gvidante sin nur per ekstera ŝajno kaj ne konsiliĝinte kun personoj, kiuj plej bone konas tiun lingvon, estus tia infanaĵo, kiun certe neniam komitato povus fari, se ĝi traktus sian taskon serioze kaj ne estus sugestata de personoj, kiuj havas ian kaŝitan celon.

Kaj se la komitatanoj decidus fari ŝanĝojn en Esperanto, kion ili povos ŝanĝi? Se ili ekzemple volos diri, «tiu vorto estas prenita el lingvo, kiun parolas cent milionoj, tial ni elĵetu ĝin kaj prenu vorton el lingvo, kiun parolas cent dudek milionoj», aŭ se ili dirus, «aĵ ni ne plaĉas la praktike tute bona vorto «estas», ni preferas «esas», k. t. p., tio estas ja simpla infanaĵo, kiun seriozaj homoj certe ne permesus al si, ĉar ili komprenus, ke en lingvo, kiu havas jam multejaran vivon, ŝanĝi grandan amason da vortoj pro simpla kaprico, pro la pure teoria kaj praktike absolute senvalora motivo estus sen-sencaĵo. Memorante, ke oni atendas de ili ne ian teorian filologian amuziĝon, sed laboron *praktikan*, ili kompreneble ŝanĝus nur tiajn vortojn aŭ formojn, kiuj montriĝis kiel malbonaj *per si mem*, malbonaj *absolute*, grave maloportunaj por la *uzantoj* de la lingvo. Sed se vi trarigardos ĉiujn kritikojn, kiuj estis faritaj kontraŭ Esperanto en la daŭro de dudektri jaroj — kaj Esperanton ja kritikis jam multaj miloj da homoj, kaj certe neniu eĉ plej malgranda el ĝiaj mankoj restis kaŝita — vi trovos, ke la grandega plimulto el tiuj kritikoj estas simple personaj kapricoj. La nombro de tiuj ŝanĝaj proponoj, kiuj efektive povus havi ian praktikan valoron, estas tiel malgranda, ke ili ĉiuj kune okupus ne pli ol unu malgrandan folieton, kiun ĉiu povus ellerni en duonhoro; sed eĉ inter tiuj tre malmultaj supozeblaj ŝanĝoj la plej gravaj estas nur plibonigo *ŝajna*, sed en efektiveco ili post pli matura pripensado montriĝus eble nur kiel malplibonigo. Tiel ekzemple la forigo de la supersignoj kaj de la akuzativo, kion mi antaŭ dek ses jaroj proponis, por liberiĝi de la turmentantoj kaj faciligi la propagandon, kaj kion postulas la plimulto de la reformistoj, tiu ŝanĝo en la *nuna* tempo, kaj tiom pli antaŭ la okuloj de registare starigota kaj sekve forton havanta komitato, devas aperi kiel tute ne akceptebla, ĉar ĝi prezentus kripligon de la *interna* valoro de la lingvo, por plaĉi al ĝiaj *eksteraj* rigardantoj, forigon de necesaj gravaj sonoj el la lingvo kaj de libera vortordo kaj klareco

por... ke la presistoj ne bezonu elspezi kelke da spesmiloj kaj la komencantoj ne havu kelkan malfacilaĵon.

Se vi prenos ian artikolon Esperantan, prezentitan de niaj kontraŭuloj, por senkreditigi Esperanton, vi preskaŭ ĉiam trovos nur unu aferon : grandan amasigon de la plurala finiĝo « j » ; tiu malfeliĉa « j », kiun neniu tamen kuraĝas kritiki en la bela greka lingvo, estas la kvintesenco de ĉiuj teruraĵoj. kiujn niaj kontraŭuloj montras en Esperanto !

Unuvorte, ĉiu el vi povas facile konvinkiĝi, ke se iam registare starigota komitato decidus fari ŝanĝojn en Esperanto kaj se tiu komitato traktos sian taskon serioze, ĝi povos ŝanĝi en Esperanto nur tre, tre malmulte ; la postkomitata Esperanto restos tute la sama lingvo, kiel la Esperanto antaŭkomitata, nur eble kelkaj nunaj formoj fariĝos arĥaismoj kaj cedos sian lokon al pli oportunaj formoj, neniel rompante la kontinuecon de la lingvo kaj neniel ruinigante la valoron de tio, kion ni ĝis nun akiris. Tio estas ne nia pia deziro, sed tion plene certigas al ni simpla logiko kaj prudento, kontraŭ kiu certe nenia serioza komitato volos peki, se ĝi ne volos, ke ĝiaj laboroj restu absolute sen ia praktika rezultato.

Nun mi resumos ĉion, kion mi diris. Logika esploro de la afero montras al ni, ke :

1 : Lingvo internacia ne povas esti alia ol Esperanto.

2 : La evoluado de la lingvo fariĝos plej kredeble nur per tiu sama natura vojo, per kiu ĝi fariĝis en ĉiu alia lingvo, t. e., per la senrompa vojo de neologismoj kaj arĥaismoj.

3 : Se iam aperos la neceso fari en Esperanto ian ŝanĝon, tion povas fari nur aŭ la esperantistoj mem, per komuna interkonsento, aŭ ia grandega forto, sed nepre en plena interkonsento kun la tuta Esperantistaro.

4 : Se iam la Esperantistoj mem aŭ ia granda ekstera forto decidus fari en Esperanto iajn ŝanĝojn, tiuj ŝanĝoj povas esti nur ekstreme malgrandaj, neniam rompos la kontinuecon kun tio, kion ni ĝis nun havis kaj neniam senvalorigos tion, kion ni ĝis nun faris, faras aŭ poste faros,

Tio estas la sole ebla natura irado de la aferoj. Ĉiu, kiu volos kontraŭbatali tiun naturan iradon, nur perdos senbezone siajn fortojn. La Esperantaj radikoj de la arbo internacilingva jam tiel profunde penetris en la teron de la vivo, ke ne povas jam ĉiu deziranto ŝanĝi la radikojn aŭ ŝovi la arbon laŭ sia bontrovo.

Karaj kongresanoj ! Ĉio, kion mi diris, ne estas ia aŭtora memfido, ĉar mi plene konsentas kaj konfesas malkaŝe, ke, por ŝanĝi ion

en la natura irado de la internacilingva afero, mi estas tiel same senpova, kiel ĉiu alia persono. Mi defendas fervore nian nunan vojon nur tial ke la nerefuteblaj leĝoj de la logiko diras al mi, ke tio estas la sola vojo, kiu kun plena certeco alkondukos nin al nia celo. Kiu ajn volus ŝanĝi la naturan iradon de la internacilingva afero — tute egale, ĉu li estas malamiko de Esperanto aŭ ĝia plej flama amiko, ĉu li estas senfamulo aŭ eminentulo, ĉu li agas per vortoj aŭ per mono kaj ruzaĵoj, ĉu li estas plej fanatika konservemulo aŭ plej facilanima eksperimentisto de novaĵoj, ĉu li estas plej pura idealisto aŭ plej profitama egoisto, ĉu li bruas kaj malbenas aŭ kaŝite laboras sub la tero — li neniam sukcesos; li povos nur krei kelktempan skismon kaj akiri la malĝojan gloron de malhelpanto kaj subfosanto, sed neniam li povos devigi ĉiujn amikojn de la internacilingva ideo pro iaj sen signifaj bagateloj forĵeti tion, kion ili posedas, kio montriĝis plene vivipova, en kion estas jam enmetita tia multego da laboroj kaj da vivo kaj kio per natura vojo devas iom post iom konstante ensorbi novajn sukajn. Tion devas bone memori ĉiuj, kiuj laboras sur la kampo de lingvo internacia, kaj se ili tion ne memoros, la vivo mem donos al ili la necesan instruon.

Ni povas sekve labori trankvile; ni ne devas malĝoji, se nia laborado estas iafoje tre malfacila kaj sendanka; sur nia flanko estas ne sole la fajro de niaj sentoj, sur nia flanko estas ankaŭ la nerefuteblaj leĝoj de la logiko kaj prudento. Pacience ni semu kaj semu, por ke niaj nepoj iam havu benitan rikolton. Al la Sesa Esperantista Kongreso, kiu sendube enĵetos multe da semoj en la teron Amerikan, mi eldiras mian koran saluton.

L.-L. ZAMENHOF



ENKETO

LA karaj amikoj Sroj. A. Lagarriga, el Sabadell kaj J. B. y F., el Moncada, bonvolis partopreni en mia proponita Enketo pri kio estas artikolo kaj ĝia gramatika sameco je la adjektivo. Tial mi ilin gratule dankas, ĉar ilia tre valora partopreno gravigis ĝin, kaj mia celo krei instruantaĵon, realiĝis.

Ni konkretigu kaj koncizigu kaj pretiĝu esti malpravaj. Se tion ni faras ni alvenos al la deca — malgraŭ maloftega — fino en inter-

konsento, kiu estas la lumo kiun signifas la proverbo, «la interdiskutado elnaskas la lumon.»

La lumo kiun nia interdiskutado devas elnaski estas la difino pri la artikolo.

Mi intencis elpruvi, per mia antaŭa verkaĵo, ke la difino pri la artikolo estas en la difino pri la adjektivo; kaj sekve ke ĝi estas ia adjektivo.

Miaj nomitaj amikoj ne konsentas mian opinion kompreneble, ĉar malsama estas nia respektiva bazo; malgraŭ tio, en niaj verkaĵoj estas komuna interkonsento; mi diris ke *tiu* (*tiu homo*) kaj la (*la homo*) havas saman komunan gramatikan sencion. Ili tute konsentus, se mi ne nomus *tiu* 'n per «adjektivo». Ĉu?

Sed mi opinias je la bazo ke *tiu* (*tiu homo*) estas adjektivo kaj ili, je la bazo ke ĝi estas pronomo. Ĉu?

Tiu estas ĉu pronomo, ĉu adjektivo. Ĉu pronomo ne estas la vorto kies ofico estas *anstataŭi la nomon*? Kial, do, karaj amikoj Lagarriga kaj J. B. y F., vi opinias ke la vorto *tiu* estas pronomo ĉe *tiu homo*? Eble mi scias tiun kialon. Vi juĝas la vortojn, en nia okazo, ekzemple, atente nur al la vortoj mem; vi scias ke *tiu* (ĉe *tiu venas*, *mia libro estas tiu*, ekzemple) estas pronomo kaj tial kiam vi vidas la vorton *tiu* vi vidas pronomon. Ĉu? Mi juĝas la vortojn nur atente al ilia gramatika ofico. Tial mi opinias ke *tiu* estas adjektivo ĉe *tiu homo*, *tiu libro*, k. c., malgraŭ ĝi estas pronomo ĉe *tiu venas* *mia libro estas tiu*, k. c.

Ankaŭ alio influas por la malsameco de nia respektiva bazo. Vi konsideras, ŝajnas al mi, ke nur estas adjektivoj la kvalitaj adjektivoj, mi konsideras ke estas adjektivoj ĉiuj vortoj, kiujn oni kunmetas kun substantivoj, por ilin kvalitie aŭ determini iel ajn. Mian pravecon pruvas la gramatikuloj klasifikantaj la adjektivojn ne nur je kvalitaj sed ankaŭ je determinaj (montraj, numeraj, posesivaj, k. a.).

Konklude, se vi konsentas ke la vorto *tiu* estas adjektivo, krom pronomo alifoje, vi konsentas ankaŭ ke la artikolo estas adjektivo.

DELFÍ DALMAU



ENLANDA MOVADO

BARCELONO

La esperantista grupo «La Rondo» disvastigis ĉie cirkulerojn alvokante per ili, reprezentantojn de ĉiuj esperantistaj societoj kaj grupoj.

La unua kunveno okazis la 29^{an} de la Septembra monato, atingante ĝi veran sukces plenecon.

Ĉeestis en tiun kunvenon grandamaso da delegitoj, kiuj reprezentis 19 el la plej gravaj societoj kaj grupoj en nia urbo, aplaudante ĉiuj la ideojn elmontritajn de la invitinta grupo.

Tio pruvis klare, evidente, ke malgraŭ ekzisti kelkaj pesimistoj aŭ laculoj, kolektiĝas sub nia standardo granda plimulto da samideanoj, kiuj certe amas Esperanto'n kaj fervore sin mem oferas por atingi plej baldaŭ kiel eble nian deziratan celon.

Okazis alia kunveno la 6^{an} de Oktobro, kaj en tiu lasta pridiskutado oni elarangis la interesan aferon, tio estas, restis fondita la «Centra Komitato» de la Barcelona Esperantistaro.

Ĝi estos la zorganto de ĉio kio estas interesinda pri nia afero, ĉefe, de tio, kio enhavas komunan rilaton enlandan kaj eksterlandan.

Ni deziras al la nova organizajo veran sukceson.

En kunsido okazinta ĉe «Espero Kataluna» la «Centra Komitato» de la «Barcelona Esperantistaro», aprobis ĝian regularon, kaj oni elektis Sron. C. Viñol kiel sekretario.

Oni bonvolu adresi la korespondadon al la nomita sekretario, ĉe «Grupo Libero», (strato Mercè, 19, Barcelono).

Novaj kursoj. — La grupoj «Barcelona Stelo» kaj «Esperanto kaj Patrujo» malfermis novajn kursojn. Nokte en la unue dirita grupo kaj dimanĉon matene en la dua.

Novajn kursojn ankaŭ malfermis : «Ciam Antaŭen», «Ateneu Enciclopedic Popular», «Paco kaj Amo» kaj «Centre Autonomista de Dependents del C. i de la I.».

La grupo «Esperanta Frateco» komencos novan kurson en tiu-ĉi monato.

Verdaj vendredoj. — La 14^{an} de Oktobro okazis ĉe «Espero Kataluna» la dua esperantista vendredo.

Dank' al la afableco de Sro. Sabadell la ĉeestantaro povis aŭdi fonografe la voĉojn de nia amata majstro Dro. Zamenhof, Baron de Ménil kaj tiu de nia amata amiko Fred. Pujolà.

Teatra festo. — Ĉe la societo «Esperanto kaj Patrujo» okazis la 23^{an} de

Septembro esperantista festo dum kiu oni ludis tre bonmaniere la komedion *Consilium Facultatis*, esperante tradukita de A. Grabowski.

La geludintoj Finoj. Fontanillas, Sandalinas, Berdemás kaj Sroj. Mestres, Bermúdez, Anglada, Bové kaj Artigas ricevis je la fino justan aplaŭdadon pro ilia laŭdinda laborado.

La nova komitato de «Esperanta Frateco» estas jene:

Prezidanto, Carles Camerino; *Sekretario*, Cristino Benach; *Kalkulisto*, Anton Rovira; *Bibliotekisto*, Sebastia Soler.

Kelkaj entuziasmaj esperantistoj dezirante havi ejon kie oni povos pli fratiĝi, elektis la Universitatan Kaftrinkejon (Universitata Placo), kie ĉiusabate kunvenas ili. Unue estis malmultaj, poste pli, kaj nun oni povas diri ke tie ĉeestas granda nombro da samideanoj.

Nian gratulojn por la iniciintoj.

La grava ĉiutaga ĵurnalo *La Publicidad* bonvolis, de la 13^{an} de Oktobro, enhavi ĉiujaŭdan esperantan rubrikon. Ĝi estos grava interrelatilo, precipe por la barcelona esperantistaro, kaj samtempe fruktodona propagandilo. La sukceso atingita de la esperanta rubriko estis grandega. Do, aĉetu ĉiujaŭde *La Publicidad*.

Datreveno de la V^a. — Por solenegi la unuan datrevenon de la V^a Internacia Esperantista Kongreso en Barcelono, «Barcelona Esperantistaro» okazigis grandajn festojn konsistantajn el teatra ludado kaj popola festmanifestacio.

La teatra ludado okazis sabaton vespere (17-9-10). Oni aplaŭdinde ludis *La Ĉiama kantaĵo*'n, tradukaĵo de A. Sabadell pri verko de nia fama kataluna verkisto Santiago Rusiñol. Ties ludintoj estas fervoraj esperantistoj de la grupo «La Rondo».

La originalan duaktan komedion de Sro. Mikaelo Cases *Vivu Esperanto!* ludis la samideanoj fervoraj de la grupo «Supren!»; kaj la grupaujo de «Barcelona Stelo» aplaŭdinde kantis *Ni estu fidelaj*.

Tiu ĉi bela festo finiĝis per baleto inter kies dancoj oni dancis la belan internacian dancon titolitan *La rondo*.

La ĉeestantaro estis multnombrega kaj la entuziasmo tre granda.

Dimanĉon posttagmeze (18-IX-10) okazis la popola festmanifestacio ĉe la Parko Güell. Ĝi konsistis el koncerto kaj dancoj (sardanoj kaj la rondo) kiujn oni entuziasplene kaj ĝaje aŭskultis, dancis kaj aplaŭdis.

Kiel finiĝon oni manifestacie revenis el la Parko Güell. La manifestaciomaso, malgraŭ la pluva vetero, estis el mil kvincent geesperantistoj kunportantaj dek kvin flagojn kiuj turnigis ĉies atenton al si, elestante tre bonan propagando por nia afero.

Eĉ ekster barcelonaj samideanoj ĉeestis tiujn festojn.

1) Tiu-ĉi recenzo ni ne povis publikigi en lasta n^o, pro manko da spaco.

GIRONA

La ĉi tieaj samideanoj ne laciĝas. Jen la kursoj malfermitaj de la du esperantistaj societoj.

Ĉe «Gerona Esperantistaro», du kursoj. Lernigantoj: Sroj. Dalmau kaj Casademont.

Ĉe «Amo kaj Espero», du kursoj. Instruantoj: Sroj. Hucas, kaj Sroj. Domenech, Ferrer kaj Boris. Plie, Sro. Hucas komencis kurson ĉe la laborista societo «La Amistad».

De la 29^a Octobro ĝis la 5^a Novembro, publike sin ekzamenos la lernintoj kiuj ĉeestis lastkurse ĉe la societo «Amo kaj Espero».

LA ESCALA

Anoj el la grupo «Paco kaj Amo» de Palafrugell, dum ekskurso tra tiu-ĉi vilaĝo organizis mitingon pri Esperanto, kiun prezidis sinjoro la urbestro. La ĉeestintoj fervore entuziasmiĝis kaj aplaudis la partoprenintoj. Brave por la grupanoj de Palafrugell.

REUS

La malnova samideano J. Sans Ferré ree forveturis al Mahó' (Balearaj Insuloj). Subskribita de li, aperis en la literatura gazeto *Foc Nou* artikolo pri Esperanto kiu daŭros en venontaj numeroj.

Multajn gratulojn ni ŝuldas al tiu samcelano pro la klopodo de li liverita al liaj samurbaj esperantistoj.

La grupo «Nova Semo» malfermis kurson ĉe «Centro de Lectura». En ĝi ĉeestas ok fraŭlinoj kaj sep fraŭloj. Paŝo post paŝo la celon ni atingos!

Ĝin instruas sinjoro E. Aguadé.

Baldaŭ estos malfermata nova kurso.

RUBÍ

Samideano el «Aplech Esperanta Grupo» de Sabadell daŭrigas kurson de Esperanto, ĉiun dimanĉon.

Antaŭ ne multe faris pri esperantan paroladon, Sro. Torruella, ano el la citita sabadell'a grupo, ĉe la «Cámara Agrícola de Rubí». Espereble nia celo baldaŭ enradikiĝos en tiu ĉi vilaĝo.

SABADELL

Ĉe la «Centre de Dependents» estas komencita nova kurso.

La katolikaj samideanoj starigis grupon nomatan «Stelo Katolika». Ĝiaj anoj aprovis la regularon, kaj baldaŭ oni elektos la komitaton por entrepreni ĝian agadon.



ALILANDA MOVADO

FRANÇA

LE HAVRE. — En el Casal Municipal d'aquesta ciutat se celebrà el dia 28 de l'últim Agost, el 3.^r Congrés de la «Federació Esperantista Normanda». Entre altres importants qüestions posades a discussió, s'acordà gestionar prop les Companyies de ferro-carrils pera obtenir autorització de fixar, en els cotxes, cartells de propaganda esperantista, induir a dites Companyies a completar per una traducció en Esperanto 'ls avisos ja donats per elles en varies llengües, a conseguir autorització pera posar, a les estacions ferroviaries, cartells informatius pera 'ls esperantistes, i a obtenir ademés iguals aventatges de les Companyies de tramvies, omnibus, vaixells i altres medis de transport de passatgers.

PARÍS. — Durant la darrera visita d'Alfons XIII a París, i en un festí amb que fou obsequiat per Mr. Fallières, aquest i demés presents se vegeren altament sorpresos al brindar el rei d'Espanya en llengua internacional.

En nom del president li respongué en el mateix idioma un agregat a l'embaixada.

Vist i comprovat per Mr. Fallières el resultat pràctic de l'Esperanto, se diu que ordená preparar un projecte de llei pera que aviat sigui obligatòria la seva ensenyança en totes les escoles franceses.

LILLE. — A les escoles primaries elementals i superiors d'aquest districte, l'ensenyança de l'Esperanto funciona regularment desde 1907. Cada any el saber dels alumnes es constatat en un examen, no obligatori, per una comissió composta de mestres d'abdós sexes i d'altres esperantistes estrangers. En els examens del curs 1909-10 s'han presentat 22 escoles amb 445 alumnes. havent-ne sigut llorejats 397, els quals han rebut un diploma.

SOTTEVILLE-LES-ROUEN. — L'Ajuntament d'aquesta ciutat, en una de ses darrerres sessions, ha acordat per unanimitat introduir l'Esperanto en els programes d'ensenyança pública, en tots els graus.

ALEMANYA

BERLIN. — El 13 de Setembre, en ocasió d'estar de pas en aquesta ciutat el Dr. Zamenhof, qui procedia d'Hamburg, les societats esperantistes organitzaren una festa en honor seu, durant la qual el mestre féu les delícies dels presents referint impressions del seu viatge a l'America i al VI.^e Congrés Internacional Esperantista.

HANNOVER. — Aquest Ajuntament ha autoritzat l'ensenyança de l'Esperanto en totes les escoles, i un curs especial n'ha sigut obert a fi de preparar els professors de les mateixes.

WORMS.—Coneixedora de l'utilitat pràctica de l'Esperanto, l'«Unió Estenogràfica» ha decidit organitzar pera 'ls seus membres un curs gratuït de l'idioma internacional.

BOHEMIA

LUHACOVICE (MORAVIA).—Per iniciativa de la «Societat Esperantista Bohèmia» ha tingut lloc en aquesta ciutat balnearia, durant els dies 13, 14 i 15 d'Agost darrer, la primera assamblea d'esperantistes moravians amb motiu de la qual s'han celebrat importants festes.

En una de les sessions s'acceptà la conclusió de demanar an el govern austriac que apoi les institucions esperantistes,

BULGARIA

SOFIA.—Del 6 al 8 d'Agost darrer, i baix l'alta protecció del ministre d'Instrucció pública, s'ha celebrat el IV Congrés d'Esperantistes Bulgars.

RUSSIA

SERPUHOV.—Durant aquest estiu, varis entusiastes esperantistes han organitzat una tandà de cursos a les ombrivoles avingudes dels jardins públics d'aquesta localitat, cridant l'atenció dels passejants, els quals s'aturaven encuriósits. Veus-aquí, aixís, en plena natura i aspirant l'aire pur, una manera pràctica i alegre de propagar i aprendre, al mateix temps, el nostre idioma internacional.

BRASIL

La Comissió d'Instrucció Pública, a proposta d'un dels seus membres, ha aprovat l'ensenyança oficial de l'Esperanto. S'han obert cursos en 10 escoles, i 400 alumnes aprenen actualment la llengua auxiliar internacional.

RUMANIA

Continúa a Bukarest un curs pera cecs, explicat actualment per un professor també cec, an el que'n concorren uns 35 d'abdós sexes, molts dels quals ja parlen perfectament l'Esperanto. La més gran alegria pera ells es el rebre lletres d'algun llunyà confrare *samsortano*. El sistema de Braille l'Esperanto són una veritable llum pera 'ls cecs.

SUECIA

S'està editant un diccionari suec-esperanto pera cecs. Constarà de tres volums, havent-se ja imprès el primer. Aquest diccionari serà 'l més extens de tots els ordinaris publicats.

MEXIC

La «Societat Esperantista» d'aquest país ha donat els informes que'l Govern li havia demanat sobre l'ensenyança de l'Esperanto a les escoles.

HOLANDA

LA HAYA. — La lliga «Nederlândia Kátoliko», societat esperantista holandesa, ha festejat l'aniversari de la seva fundació, obtenint un gros exit.



OFICIALA PARTO

Reunits els senyors que componen el Consell Directiu de «K. E. F.», en el domicili del seu president, Sr. Bremon, el dia 10 d'Octubre, se prengueren els següents acords :

- 1.^r Enviar una circular als grups no adherits a fi de que s'adhereixin o, en cas contrari, exposin els motius que tinguin pera no fer-ho.
- 2.ⁿ Enviar als companys de Tarragona instruccions pera començar l'organització del nostre segon Congrés, el qual ha de celebrar-se a dita ciutat:
- 3.^r Felicitar a la direcció de *La Publicidad* per haver obert en les seves columnes una secció esperantista setmanal.
- 4.^t Haver vist amb disgust la calumniosa campanya de *Le Monde Esperantiste* contra diverses personalitats esperantistes.
- 5.^f Començar l'estudi d'un projecte a fi de que «K. E. F.» pugui editar obres en Esperanto pera regalar als seus federats junt amb K. E.
- 6.^e Adherir-se a l'«Internacia Konsilantaro» i nomenar a l'efecte un delegat, recaient el nomenament pera aquest carreg an el senyor president de «K. E. F.», Dr. Bremon Masgrau.
- 7.^e Haver vist amb satisfacció que'l nombre de federats augmenta considerablement de mes en mes, com també'l de grups que s'adhereixen.

La Direcció de K. E. recorda novament anels senyors delegats que, a l'objecte de no retrassar la sortida de K. E., llurs ressenyes han d'esser remeses ans del 20 de cada mes.

A l'ensemps hem de pregar-los que's concretin a donar-nos les noves del moviment de llurs localitats en forma breu i sintetica, a fi de poder donar cabuda a l'original d'actualitat, i que'l franquegin sempre amb l'epigraf *Originals pera impremta* i el sobre desclos.

L'Administració de «K. E. F.» recorda an els senyors delegats i particulars que encara han de saldar llurs quotes, ho facin com més aviat millor, car, havent-se de fer l'estat de comptes a fi d'any, es necessari que totes les quotes estiguin saldades.

Els senyors particulars aqui no sigui posible veure 'ls delegats de llurs respectives localitats, poden enviar l'import de les quotes, en timbres postals de 15 centims de pesseta, an questa Administració.